# Eventa Servo: teknologiaj novigoj por pli moderna kaj alirebla platformo

Yves Nevelsteen
kaj Fernando Ŝajani

Inter januaro kaj aprilo 2026 la teamo de Eventa Servo de UEA realigis gravajn paŝojn antaŭen. Fernando Ŝajani profunde modernigis la teknologian infrastrukturon de la platformo, kun klara celo: plibonigi la sperton de uzantoj kaj administrantoj. Dank' al tiuj laboroj, Eventa Servo nun funkcias sur pli moderna kaj sekura teknologia bazo, estas pli alirebla por ĉiuj uzantoj, kaj disponas pri administra ilo pli potenca kaj pli bone adaptita al la konkretaj bezonoj de nia komunumo. Jen mallonga superrigardo pri la ĉefaj progresoj.

## 1. Modernigo de la administra panelo

La plej grava ŝanĝo estis la anstataŭigo de la malnova sistemo ActiveAdmin per propra administra panelo.

La nova interfaco por administri uzantojn, eventojn, organizaĵojn kaj raportojn nun sekvas la vidan identecon de la projekto, tiel ke la tuta sistemo fariĝis pli kohera kaj profesia. Samtempe la panelo estis desegnita por esti pli rapida kaj intuicia, kio faciligas la ĉiutagan moderigadon de enhavoj. Aldoniĝis ankaŭ novaj funkcioj, inter ili progresintaj filtriloj kaj plibonigitaj statistikaj paneloj, kiuj ebligas pli precizan superrigardon pri la stato de la platformo.

## 2. Teknologia salto en la infrastrukturo

Eventa Servo trapasis ampleksan ĝisdatigon de sia interna "motoro", por garantii sekurecon, stabilecon kaj longdaŭran evolu-eblon.

La migrado al Rails 8.1 kaj Ruby 3.4.8 signifas transiron al la plej freŝaj versioj de la bazaj teknologioj, kun evidentaj avantaĝoj rilate al rendimento kaj sekureco. La vida biblioteko estis ĝisdatigita al Bootstrap 5.3, kio ebligas pli modernan, respondan kaj alireblan interfacon. Krome la malnova dosierdukto estis anstataŭigita per nuntempaj iloj kiel Propshaft kaj esbuild, kio rezultas en pli rapida ŝarĝado de paĝoj kaj pli glata uzado.

## 3. Pli bona uzantsperto kaj alirebleco

Pluraj ŝanĝoj estis enkondukitaj kun rekta atento al la sperto de la uzantoj.


Aparta emfazo estis donita al alirebleco. Danke al sistema uzo de ARIA-etikedoj kaj plibonigoj en formularoj, la platformo fariĝis pli uzebla ankaŭ por homoj kun malkapabloj. La serĉado estis plifortigita per nova sistemo de filtriloj en la paĝo de "Instruantoj" – tio estas, instruistoj kaj prelegantoj – kaj per ĝeneralaj plibonigoj de la serĉfunkcio.

Ankaŭ sekureco de uzantoj ricevis atenton: nun eblas regeneri API-ĵetonojn, tiel ke ĉiu uzanto havas pli grandan kontrolon pri sia sekureco. Grava teknika korekto koncernis horzonojn en la eksporto al kalendaroj, ekzemple Google Calendar, por certigi ke eventoj aperu je la ĝusta horo tutmonde. Fine, la navigado sur la ĉefpaĝo estis simpligita per nova falmenuo "Monato", kiu ebligas rapide salti al la unua semajno de elektita monato.

## 4. Rendimento kaj stabileco

La sistemo fariĝis ne nur pli moderna, sed ankaŭ pli malpeza kaj pli fidinda.

Per optimumigo de la datumbazo oni reduktis nenecesajn demandojn kaj enkondukis inteligentajn indeksojn, kiuj signife akcelas la listigon de eventoj laŭ kontinentoj. La tuta testbazo estis migrigita al Minitest, kio faras la disvolvan procezon pli vigla kaj samtempe helpas certigi, ke novaj ŝanĝoj ne rompu jam ekzistantajn funkciojn. Krome pliboniĝis la liverado de bildoj kaj dosieroj pere de CDN kaj kaŝmemoraj mekanismoj, tiel ke fotoj kaj aldonaĵoj ŝarĝiĝas pli rapide tra la mondo.




Ekzemplo de tiu evoluo videblas ankaŭ en la eventaj paĝoj mem, kie ĉiam pli da bildoj estas aldonataj por riĉigi la prezentadon de aranĝoj.

### Kontaktu nin

Ĉu vi havas demandojn pri Eventa Servo? Ĉu vi volas kunlabori aŭ proponi pliajn plibonigojn? Ne hezitu kontakti nin per retmesaĝo ĉe *kontakto@eventaservo.org*.

